

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE  
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE  
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 M ROUEN.

===== la n°: 4 F. Abono: 15 F. Katizo: 5 F. Sume: 20 F. =====

+++++

N. B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la  
10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N° 132 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

===== MARTO 1982 =====

+++++

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Nous rappelons à tous les membres de notre Association notre congrès annuel qui aura lieu à Nancy, et qui devra marquer une nouvelle étape dans la vie de notre groupe.

La réussite de ce congrès tiendra à ce que le plus grand nombre de participants se retrouvent à ces journées, mais aussi à ce que ceux qui ne peuvent venir sur place envoient eux aussi leur adhésion et tout au moins leurs encouragements, et nous fassent connaître leurs idées, leurs suggestions pour l'efficacité de notre action.

A Nancy, le L.O.K. (Loka Organiza Komitato), présidé par P-ro Degrelle, s'apprête à nous accueillir pour célébrer ensemble la liturgie pascale précédée d'une préparation spirituelle, puis pour tenir notre congrès proprement dit, qui s'achèvera dans une détente fraternelle et la découverte de la ville des ducs de Lorraine et de Stanislas Leczinsky.

Mais, m'adressant ici, à travers nos adhérents, aux personnes qui pourront chercher à connaître notre mouvement, je voudrais évoquer en quelques mots ce qui le caractérise.

A notre époque matérialiste, beaucoup s'étonnent que la plupart de ceux qui deviennent espérantistes ne le font pas tout d'abord pour en tirer un profit. En effet, dès la fin du siècle dernier, le développement de la Langue Internationale est dû à sa vocation culturelle à l'échelle mondiale; de nombreux poètes et écrivains, des revues périodiques l'ont fait entrer dans le domaine intellectuel et spirituel par des oeuvres originales et par des traductions. Dès le premier congrès universel qui s'est tenu à Boulogne-sur-Mer en 1905, et depuis dans de nombreuses rencontres internationales, l'Espéranto a prouvé son caractère fonctionnel comme moyen d'échange accessible à tous les milieux, à toutes les cultures, à tous les objectifs.

.. / ...

Dès le début de la diffusion des oeuvres de Zamenhof, celles-ci ont retenu l'attention de catholiques. Il suffit de citer Mgr Dombrowski, écrivain et poète, l'abbé Emile Peltier, fondateur de la revue "Espero Katolika" (1903), l'abbé Austin Richardson, fondateur de IKUE, Mgr Luigi Giambene qui présenta cette revue à SS. Pie X, et transmit la lettre accordant la bénédiction apostolique et les encouragements du Souverain Pontife à ses rédacteurs (1906).

Le message de Zamenhof fut un appel à l'harmonie entre tous les hommes. Les espérantistes catholiques ont toujours été parmi ses meilleurs disciples. Et plus que jamais, à la suite des papes contemporains, ils veulent être au service de l'égalité entre les hommes, du respect de leurs droits fondamentaux, de la construction de la paix.

Autant que les grands moyens des médias, le rôle des individus et des petits groupes en relation de pays à pays est indispensable; les déclarations des gouvernants et des leaders n'auront jamais de valeur que s'ils sont l'écho d'une volonté commune au niveau des peuples.

Telles sont les pensées et intentions que nous présenterons au Christ ressuscité en célébrant le mystère pascal; puissent-elles être celles de tous ceux qui, de près ou de loin, se sentiront en communion à l'occasion de notre congrès.

R. Cl. COLAS.

XX

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 13-a DE DECEMBRO 1981.

Ĉeestas: P. Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux, S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: P. Degrelle, S-roj Bessière kaj Lecocq.

La kunsido komenciĝas je la 14.30 per kanto al la Virgino "Donu vian Filion", en tiu adventa tempo. Ni aprobas la tagordon kaj raporton de la antaŭa kunsido.

FKEA-kongreso: ĝi okazos en Nancy (10/12-an de aprilo 82). Programo kaj aliĝilo en bulteno n° 131. Aliĝu frue kaj venu multnombre. Temo: Kie troviĝas la fontoj de la paco? (preparado al la programo de la IKUE-kongreso en Lille)

Pax-Christi: kelkaj abonantoj regule skribas kaj parolas pri Esperanto. Pli larĝa debato kum la legantoj estas dezirinda. Ju pli da esperantistoj skribos, des pli ili havos bonŝancon, ke io efektiviĝos.

Radio-elsendoj: estus bone informiĝi pri la horoj de la diversaj esperanto-elsendoj. Ni aŭskultu ilin kaj skribu rimarkojn kaj sugestojn.

Esperanta rozario: jam multaj diras, ĉiutage, unu dekon de la rozario. Ni daŭrigu kaj diskonigu tiun bonan preĝon.

Alia agado: ni atente legu la artikolon de la frontpaĝo, kiu imstigas nin fari ion, kiel kristanoj kaj esperantistoj.

Bulteno: la poŝtestro postulas pli bonan enpaĝigon.

Financoj: la prezoj plialtiĝas, sekve ankaŭ la kotizoj. Sur la lasta paĝo de n° 131 aperas la nova kotiztabelo. Krome, ĉiam eblas fari donacojn. Ili estas bonvenaj, kaj ni antaŭe dankas vin.

Radio Vatikana: pli oftaj elsendoj en Esperanto okazis je Kristnasko kaj la jara fino. La multaj elsendoj en la diversaj landoj donas al Esperanto bonan rangon inter la multnombraj lingvoj. Skribu ofte kaj amase!

Tombo de P. Peltier, fondinto de EK. Oni kolektas monon por meti novan ŝtonon sur lian tombon, kiu estas en tre malbona stato en Lourdes. Prezo aperos en EK. Oni petas, ke la Papaj preĝintencoj aperu en FKE.

Oni planas kongresi en Lourdes en 1983.

Venonta komitatkunsido: 14-an de marto.

La kunsido finiĝas je la 17-a per la preĝo de unu deko de la rozario.

Protokolis: G. Preux.

XX

NIA MEMBRARO

Novaj anoj: 1) P-ro BALLANGER (Gironde); 2) S-ro OUDRY (I & V)

Ni plej frate bonvenigas ilin en nia rondo!

Bonfaraj membroj: 2) S-ro BIRON (Sarthe); 3) S-ro PERRETTE (M & L)

Plej koran dankon al ili pro ilia grava financa helpo!

LA GOJAJ MISTEROJ (daŭrigo)

Okis tagoj: puriĝis Maria, kaj Jesuo  
Estas cirkumcidita. Nun Jozefo al Templo  
Kondukas la duopon laŭ la sankta ekzemplo  
De ĉiuj antaŭuloj sub la Moseinfluo.

Mortis la kolombidoj. Jubilu tre tra l' bruo  
Popola, ho justulo, ĉar venis la frandtempo  
Por ĝui la Savanton en adora kontemplo.  
Ekstaru, oldulino, por la dankreddevuo.

Anna kaj Simeono, vi vere rajtas ĝoji  
Pro la Mesi-alveno. Ĉu vi ne aŭdas boji  
Surligna apudulo post la juĝmaskarado?

Sango ree elfluas ankaŭ el la panja kor',  
Dum Johano ekvidas egecon de la dolor',  
Kiam sur mont' okazas la dua prezentado.

(27/12/80)

Maria kun Jozefo amfl legis la infanon  
Kreskantan, fortiĝantan ĝis la saĝeca pleno.  
Jesuo patrohela vivis en Di-sereno  
Kaj lignon prilaboris por gajni sian panon.

Dekdujara kantinte la glorpaskan hosanon,  
Ne timante restadi por nemies kompreno  
En templo kaj sen zorgo pri l' gepatra ĉagreno  
Li forlasis sekrete la pilgrim-akompanion.

Meze de l' instruistoj li almetas kialon,  
Kielon kaj kiamon forŝirante l' vualon  
Sternitan sanktaloke pro la mona marĉando.

"Ni ne kaptas, ho filo, la sencon de via dir',  
Kia estas via kor' kaj kia via dezir'".  
-"Panjo, ne hastu! Venos la surkruca demando".

(27/12/80)

KELKAJ TANKAĜOJ (daŭrigo)

Mi estas nuda  
Ho Patro, mia Dio,  
Pro aĉa trompo.  
Edzino tutapuda  
Spertadas ja pri tio.

Edzino kara  
Ekplukis ruĝan pomon.  
Por doni al mi.  
Ĝi naskis, tre amara,  
Terure aĉan vomon.

Serpento trompis  
Mi plukis el la arbo  
La ruĝan frukton.  
Sed mian koron romp  
La tre malbona varbo.

Surventre rampu  
Sen ajn alternativo,  
Serpento misa.  
Surpolve ĉiam kampu  
Dum via tuta vivo.

Vi streĉe naskos  
Infanon tre envia  
Je mola onto.  
Humile vi ja taskos  
Por rega edzo via.

Edzo, abee  
Vi spertos ŝviton, dornojn  
Laborokaze.  
Kaj fine maŭzolee,  
Vi trafos mortokornojn.

Edzinon sian  
Adamo nomis Eva,  
Ĉar ties tasko  
Kondukis ĝin misian  
Ĝis filan Kriston reva.

Unua filo:  
Kaino, homakiro.  
Habelo dua.  
Jam jenas en profilo  
De frata mortdisŝiro.

La ĉefpaŝtisto  
Ricevia dian benon  
Pro sia dono.  
Kaino en persisto  
Heredis la ĉagrenon.

Kaino mia  
Pro kio vi koleras  
Mortige preta?  
Tutcerte peko fia  
Neniam efemerus.

Sango de l' frato  
Al mia koro krias,  
Kaino mia.  
Kaj la mortinta vango  
Ĝis nun premarias.

DEGRELLE Roger

\*\*\*\*\*

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1981

ENSPEZOJ	!	ELSPEZOJ	
Kotizoj	4 039,49	! Bulteno	1 754,50
Donacoj	868,40	! Korespondado	629,30
Rentumo ŝparkaso	99,15	! Vojaĝoj komitatanoj	1 266,00
Deponoj ŝparkaso	415,15	! Diversaj	43,70
	<u>5 422,19</u>	!	<u>3 693,50</u>

.../...

Pozitiva saldo	1 728,69
En la kaso la 1/1/1981	<u>1 531,46</u>
En la kaso la 31/12/81	<u><u>3 260,15</u></u>

XX

RADIO ROMA ESPERANTO

SAVENDA MONAĤEJO Teksto de Gabbiano, trad. de De Salvo

La loĝantaro de Fabriano sin devigis savi el la disfalo malnovan monaĥejon kiu situas sur kruta roko ĉe la limo inter la regionoj Markoj kaj Umbrio (centra Italujo). Temas pri la ermitejo de S-ta Jeronimo, sur monto Cucco, kiu, antaŭ 500 jaroj, estis tre renoma el la religia vidpunkto. La monaĥejo gastigas, nuntempe, 4 kamaldulanajn monaĥojn, kiuj laboregas por konservi ĝin.

Ĉirkaŭite de grotoj kaj fontoj, meze de densa vegetaĵo, la monaĥejo estas kunligita kum la valo pere de vojo, kiu povas esti laŭirita nur de muloj, tute ne de aŭtomobiloj. Por restaŭri la partojn en pli malbonaj kondiĉoj, la monaĥoj - cetere kiel la kunfratoj de antaŭ 500 jaroj - paciencie suprenportas, pere de muloj, kalkon kaj laborilojn, cementon kaj ferajn stangetojn. Per la helpo de la loĝantoj de Fabriano, ili planas rekonduki al la originalaj strukturoj la malgrandan preĝejon, la sonorilturon, la manĝejon kaj la monaĥajn ĉelojn; daŭre ekzistas, kontraŭe, la iama fontano, la legomejo kaj la tombejo.

La entrepreno ne estas facila, ankaŭ ĉar la naturamantoj de Fabriano malaprobas la konstruadon de strato: "Ni savos ĉar la ermitejon - ili diras - ĉar ĝi estas eksterordinara elemento historia kaj spirita, sed ni savos ĝin en rilato kun la medio, kiu siatempe, estis elektita de la unuaj ermitoj. Kian sencon havus la ebleco atingi ĝin aŭtomobile?"

KRISTANAJ RADIKOJ Teksto de Caporilli, trad. de De Salvo

La komunaj kristanaj radikoj de la eŭropaj nacioj: jen la temo de internacia kolokvo, iniciatita de la Pontifika Laterana Universitato kaj de la Katolika Universitato de Lublino (Pollando), kiu havis lokon en Romo de la 3-a ĝis la 7-a de novembro, kun la partopreno de pli ol 200 studuloj el la tuta mondo.

La celo estas tiu, igi konkreta la alvokon de la Papo por iu unueco de tiuj popoloj de Eŭropo, kiu povas efektiviĝi nur pere de la remalkovro kaj valorigo de la komunaj kristanaj radikoj, trans la nunaj disiĝoj ligitaj kun la reĝimoj, la ideologioj, la ekonomiaj kaj politikaj sistemoj. En Eŭropo, plurfoje asertis Johano Paŭlo dua, ne ekzistas Oriento kaj Okcidento reciproke kontraŭstaraj, sed unu sola familio de popoloj kun diversaj kulturaj karakterizoj, kiuj, tamen, kompletigas unu la alian. Por daŭre havi iun funkcion en la monda kunteksto, Eŭropo devas reunuiĝi, kaj, ĉar la ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj ne sufiĉas tiucele, oni devas iri pli profunden, al la etikaj, religiaj kaj kulturaj bazoj.

Jen la premisoj de la organizintoj, kiuj celis ankaŭ iun difinon de la nunaj rilatoj inter la kulturoj slava kaj okcidenta. Oni pristudis la pasintecon de la evangelizado, la cirkuladon de la kulturaj interŝanĝoj inter la eŭropaj nacioj, kaj ankaŭ la kaŭzojn de la paŭzo en tiuj rilatoj, kiu, laŭgrade, kondukis al iu spirita disiĝo, pli frue ol disiĝo politika. Ĉiukaze, iu portempa disiĝo, kiu, espereble, povos esti superata en la estonteco.

PAPAJ VOJAĜOJ Teksto de Ciotti, trad. de De Salvo

Johano Paŭlo dua planas, por la venontaj tri jaroj, intensan programon de animzorgaj vojaĝoj al la tuta mondo. La Papo ĵus akceptis la inviton iri al Suda Koreujo en 1984, okaze de la celebrado de la 200-jara datreveno de la evangelizado de tiu lando; tiel, Suda Koreujo iĝis la 36-a lando, kiun la Papo vizitis aŭ intencas viziti.

Johano Paŭlo dua komencos sian pilgrimadon la 13-an de majo 1982, irante al Fatimo, en Portugalujo. Povas esti, ke survoje li haltos en Lourdes, Francujo, kien li ne povis iri, pasintan julion, pro la atenco. Poste, ĉe la fino de majo, la Papo vizitos Britujon, kie, laŭ la antaŭvidoj de multaj, li faros historian eldiron, kune kum la anglikana ĉefepiskopo de Canterbury, rilate la denovan dialogon inter la du Eklezioj. Junie, la Papo iros al Genevo, Svislando, ĉe la Internacia Labor-Oficejo. En aŭgusto, li estos en Pollando, ĉe la Sanktejo de la Madono de Ĉenstoŝovo. Krome, oni taksas tre probable iun viziton al Hispanujo kaj duan vojaĝon al Meksikio, kun halto en Kubo. Same en Latinameriko, la Papo estas atendata en Peruo, Panamo, Ekvadoro, Bolivio, Kolombio, Venezuelo kaj Nikaragvo.



LINGVA ANGULO

Sajnas, ke tiu rubriko jam tro longe daŭras kaj ne plu interesas niajn legantojn, ĉar venis nur 3 respondoj, nome de S-ro BOURGOIS (B), S-ino MICHAU (M) kaj anonimulo (N). Jen iliaj tradukoj:

- 1) être beau joueur: konfesi sian malvenkon, agnoski sian malsuperecon (B); egalhumore akcepti ludokapricojn (M); sportive ludi (N).
- 2) il boit cela comme du petit lait: li trinkas tion tute facile, kiel senkreman lakton (B); li trinkas alkoholon tiel facile kiel selakton (M); li naive tion kreadas (N).
- 3) faire bon ménage: harmonie kunvivi (B, M, N); amike kunvivi (B); bone akordiĝi (M, N).
- 4) c' est de bonne guerre: ĝi estas permesita batalrimedo (B); estas lojala kontraŭstaro, batalo (M); estas tute juste (N).
- 5) bosser comme un chef: majstre, lertege labori (B); labori kiel metiestro (M); estrece penadi (N).
- 6) être chassé comme un malpropre: esti elpelita kiel malpurulo, sentaŭgulo (B); esti pelata kiel aĉulo, fiulo (M); esti forpelita kiel sentaŭgulo (N).
- 7) elle a du chien: ŝi estas seksalloga (B); ŝi havas allogan aspekton, sintenan (M); tipa, seksvokiva ŝi estas (N).
- 8) ce n' est pas fait pour les chiens: ja uzende! (B); tio ne estas sencele farita (M); ne por hundoj taŭgas (N).
- 9) autant choisir entre la peste et le choléra: elekti inter pesto kaj ĥolero same efikus (B); eventoj same malbonegaj, jen embarasiga dilemo (M); ne pli bone ol elekti inter pesto kaj ĥolero (N).
- 10) ça coule de source: ŝprucas fonte (B); tio mem evidentiĝas (M); elfonte elfluas (N).

Unua klasifiko: 1) en egaleco S-ino MICHAU kaj S-ro BOURGOIS (5 p.); 3) anonimulo (3).

S-ro Bourgois proponas al vi la jenajn esprimojn: 1) c' est un coup de poignard dans le dos; 2) faire des débuts fracassants; 3) il a décroché la timbale; 4) il reste sur ses positions; 5) se draper dans sa dignité; 6) faire un effet boeuf; 7) emboucher les mêmes trompettes; 8) c' est entré dans les mœurs; 9) je n' en ai rien à faire; 10) il est frit.

Se ne venos pli da respondoj, memkompreneble, ni ne povos aljuĝi 3 premiojn sed nur UNU!!

oo

FKEA-KONGRESO EN NANCY

RESTADPREZOJ: dormoĉambro + matenmanĝo:	25 F
tagmanĝo:	25 F
vespermanĝo:	20 F
luado de littukoj:	12 F

(vi povas kunporti viajn proprajn)

N.B.: ne eblos vespermanĝi vendredon!

oo

UNUA NEĜO, de Antonina APOLLO (Estonio)

Kial vento laŭte bruas,  
kial arbojn forte skuas,  
kial nuboj pendas peze  
kaj krepuskas jam tagmeze?  
Pereadas en distanco  
de neĝeroj blanka danco,  
la vertiĝe arda svarmo  
tenas min en morta ĉarmo.

Ĉio, ĉio jam forpasis,  
nur la memoraĵojn lasis  
pri la varmo de somero,  
pri atendo kaj espero.  
Pasis, pasis tagoj helaj,  
velkis buntaj floroj belaj,  
vanaj la fabeloj estis,  
nur la blanka neĝo restis.

INTERNACIA PRINTEMPA SEMAJNO EN GRESILLON (4-11-an de aprilo 1982)

Internacia renkonto de infanoj; diskutrondoj pri lingvoinstruado

MATENE: 9.15-10h kaj 10.15-11h: kursoj  
11-12.30: liberaj okupoj (ludoj, sporto...)  
11.15-12.15: diskutrondoj

POSTTAGMEZE: diversaj komunaj aranĝoj (promenadoj, ekskursoj, verkado kaj ilustrado de taggazeto, preparo de la vesperoj, sporto-turniroj...)

VESPERE: 20.45-22h: distraj aranĝoj (kantoj, lumbildoj, teatraĵetoj...)

Ni helpos la infanojn memstare organizi sian programon. En la antaŭaj jaroj, ili jam sukcesis sin organizi parte, pri sporto kaj preparo de pup-teatraĵoj.

- DISKUTTEMOJ:
1. Ĉar Esperanto ne havas la saman lokon kiel la aliaj fremdaj lingvoj, kion ni devas instrui al la infanoj (gramatikeroj, vorttrezoro pri kiuj temoj...)
  2. Komparo inter la oficiala lingvoinstruado kaj ties uzataj metodoj, kaj la Esperanto-instruado.
  3. Organizo kaj efiko de internacia korespondado.
  4. Enhavo kaj rolo de internaciaj renkontoj por infanoj.

La partoprenontoj bonvolu jam cerbumi pri tiuj temoj aŭ pri unu el ili. Ni konscias, ke tiu programo estas vasta; ni ne povos funde pritrakti ĝin, sed ni esperas eltiri kelkajn praktikajn gvidliniojn.

Aliĝojn al Esperanto Kulturdomo Grésillon 49150 BAUGE.

\*\*\*\*\*

IKUE-MEMBROJ EN FRANCLANDO 1982

1. M. Collet; 2. R. Tournay; 3. A. Ribot; 4. R. Tiercé; 5. G. Schmeider; 6. B. Sautreuil; 7. Gef-toj Lance; 8. F-toj Mainvis; 9. F-toj Harivel; 10. F. Simonnet; 11. R. Rolland; 12. M. Aminot; 13. E. Thiollière; 14. J. Amouroux; 15. A. Bessière; 16. R. Despiney; 17. P. Chatelus; 18. L. Vernin; 19. P. Vermin; 20. E. De Zilah; 21. J. Doyelle; 22. R. Jossinet; 23. C. De Balliencourt; 24. G. Villeneuve; 25. L. Goudé; 26. M. Goudé; 27. B. Cheverry; 28. P. Royer; 29. R. Cuvelier; 30. M. Vérité; 31. R. Baradel; 32. J. Vigner; 33. R.C.Colas; 34. J. Kraemer; 35. A. Gourdon; 36. A. Augen; 37. C. Sanson; 38. Esperanto-Rueil; 39. L. Biron; 40. G. Nocq; 41. G. Preux; 42. M. Lapierre.

Kun plezuro mi notas, ke de jaro al jaro, pli ĝruiĝas la abonrenoviĝo de la plimulto. Lastjare, je la sama dato, nur 32 renovigis sian abonon kaj, en 1980, nur 30. Mi do povas proklami: dankon kaj gratulon, ĉar vi multe helpas la nacian peranton kaj la internacian sekretarion!

Restas iu ombro: en Franclando, ni estas pli ol 150 membroj en la nacia asocio kaj ni finis la lastan jaron kun 60 anoj ĉe IKUE. Ĉu eblas? Se ni volas, ke Esperanto eniru pli profunden en la vivon de la Eklezio, ni devige bezonas multe pli da IKUE-anoj. Mi petas, ke ĉiu FKEA-ano pripensu la aferon kaj faru sian eblon por iĝi IKUE-ano: ju pli ni estos, des pli grava estos la voĉo de IKUE ĉe la Papo kaj ties helpantoj.

Ĉijare la IKUE-kongreso okazos en nia lando: ĉu tiu evento ne povas esti plifortigo de IKUE en Franclando? Mi opinias - kaj kredas - ke jes.

Roger DEGRELLE, peranto por IKUE en Franclando

\*\*\*\*\*

LA 39-a IKUE-KONGRESO

En nia tempo de terura vetarmado, de universala perforto, la 39-a IKUE-kongreso devas helpi kristanajn esperantistojn uzi kaj disvastigi la adaptitan ilon, kiun Zamenhof providence donis al ni. Tiu kongreso estos la kongreso de la PACO.

Por bone prepari ĝin, ni povos denove legi la faman enciklikon "La surtera Paco" de la bona Papo Johano XXIII, la unua granda encikliko pri la Paco. Jen kelkaj paragrafoj koncerne la malarmadon:

"Aliflanke ni vidas kun granda ĉagreno, ke en la ekonomie fortaj landoj estas fabrikataj kaj ankoraŭ fabrikataj teruraj militarmiloj, kaj ke por tio estas uzataj la plej granda spirita energio kaj multegaj materiaj valoroj. La sekvo de tio estas ke, dum la civitanoj de la koncernaj landoj devas porti pezajn ŝarĝojn, aliaj landoj urĝe bezonas helpon por povi ekonomie kaj sociale progresi.

.. / ...

Per justigi ĉi tiun armadon oni kutimas diri, ke sub la nunaj cirkonstancoj la paco oni povas sekurigi nur per egaleco en armado. Se la militpotenco ie estas plialtigita, oni aliloke tuj streĉas siajn fortojn por ankaŭ suprenpuŝi la propran armadon. Se iu lando estas provizita per kernarmiloj, tio por aliaj landoj estas motivo akiri armilojn kum la sama neniiga potenco.

Tiel la popoloj senĉese vivas en angoro, sub la minaco de terura katastrofo kiu ĉiumomente povas eksplodi. Kaj prave: ĉar la armiloj estas pretaj. Kvankam apenaŭ estas kredinde, ke homoj kuraĝus preni sur sin la respondecon por murdado, por mortigado kaj por ĉiuj tiuj neimageblaj ruinigoj, kiujn milito rezultigas, oni tamen ne povas nei, ke senintence kaj neatendite milito povas eksplodi. Kaj krome, kvankam tiu senekzempla armado nuntempe retenas la homojn komenci militon, oni tamen devas timi, ke la jam por militaj celoj faritaj kernprovvoj, se ili ne estas ĉesigataj, grave povos endanĝerigi la vivon sur la tero.

Justeco, racieco kaj kompreno pri la homa digno tial urĝe postulas, ke ĉesu la vetkuro al armado. Ili postulas, ke la armiloj, kiuj jam estas disponeblaj en multaj landoj, ambaŭflanke kaj samtempe estu malpliigataj; ke oni malpermesu kernarmilojn; ke ĉiuj landoj venu al interkonsento pri malarmado kum efektiva reciproka kontrolo. "Per ĉiuj fortoj oni devas malhelpi - diris nia antaŭulo Pio XII - ke mondmilito, kun siaj ekonomiaj kaj socialaj ruinigoj kaj siaj moralaj misplayoj kaj ĥaoso, turmentos la homaron trian fojojn". (Kristnaska mesaĝo 1941)

Ĉiuj tamen devas esti konvinkitaj, ke ĉesigo de la armada vetkuro, la malpliigo kaj - tio estas plej grava - la totala forigo de la armado ne estas eblaj, se oni samtempe ne atingas kompletan malarmadon ankaŭ en la spiritoj de la homoj. Ĉiuj devas unuanime kaj sincere kunlabori por ekstermi la militpsikozon. Tio postulas, ke la leĝo, sur kiu nun baziĝas la paco, estu antaŭigata de tute alia leĝo: la vera paco inter la popoloj ne baziĝu sur ekvilibro en la armado, sed sur reciproka fido. Ni kredas, ke ĉi tio devas esti ebla. Temas ja pri afero, kiu estas racia, plej dezirinda kaj de la plej alta utilo.

Racia: Ĉiu ja scias, aŭ almenaŭ devas scii, ke la rilatojn inter la ŝtatoj, same kiel inter la individuoj, oni ne povas aranĝi per armila perforto, sed nur per la racio, t.e. per la vero, la justeco, la homa solidareco.

Plej dezirinda: kiu ne arde desiras, ke oni eliminu la ŝancon por milito, sekurigu la paco kaj ĉiam pli forte gardu?

De la plej alta utilo: la paco estos profito por ĉiuj: por la individuoj, la familioj, la popoloj, la tuta homaro. La averto de Pio XII ankoraŭ resonas en niaj oreloj: "Per la paco ni nenion perdas, per la milito ni povas perdi ĉion". (Radiomesaĝo de 24 aŭg. 1939)

Kiel anstataŭanto de Jesuo Kristo, la Savanto de l' mondo kaj Pacofaranto, kiel interpretisto de la plej ardaĵaj deziroj de la tuta homa familio, puŝita de patra amo por ĉiuj homoj, mi kredas, ke estas nia devo, ĵurpeti ĉiujn homojn kaj ĉefe la regantojn, ke ili, ŝparu nek zorgojn nek penadojn, ĝis la stato de la mondo konkordos kun la racio kaj la homa digno. En la plej altaj kaj plej kompetentaj kunvenoj oni ĝisfunde devas pristudi la demandon, kiel en la tuta mondo oni povas atingi pli homan ekvilibron en la interaciaj rilatoj; ekvilibro, kiu baziĝas sur reciproka fido, lojala interkonsento, fidela oboe al la akceptitaj konvencioj. Ĉi tiun aferon oni devas ĝisfunde kaj ĉiuaspekte esplori, ĝis oni trovos bazon, kiu povas servi kiel deirpunkto por amikaj, daŭraj kaj fekundaj kontraktoj.

Niaflanke ni senĉese petegas la benon de Dio super tiu laboro: ĝi konduku al pozitivaj rezultoj."

\* \* \*

La IKUE-kongreso okazos en LILLE de la 17-a de julio posttagmeze ĝis la 23-a de julio matene. Informas: P. Bourdon, 7, av. Salomon, 59000 LILLE.

=====

ESPERANTO EN LA RADIO (sendis G. Villeneuve)

N.B. Depost la 13-a de decembro Radio Polonia ne plu elsendas en Esperanto.

Mi substrekis la ondolongojn kaj frekvencojn, kiujn mi facile kaptas, tamen provu la aliajn. La indikitaj horoj estas la francaj.

Ĉiutage: 21-21.30 - Pekino 40,16 - 32,03 - 30,10 m  
7470 9365 9965 khz

23.30 - 24 - Pekino 30,4 - 19,78 m  
9860 15165 khz

Dimanĉe: 6.45-6.57 - Vieno 48,74 - 24,97 - 16,91 m  
6155 12015 17745 khz

.. / ...



21.05-21.15 - Vatikano: 196 - 48,47 - 48,31 - 41,38 - 31,17 - 31,10 -  
1530 6190 - 6210 7250 9625 9645  
25,65 - 19,84 m  
11700 15120 khz

Lunde: 19-19.10 - Berno 75,28 - 48,66 - 31,46 m  
3985 6165 9535 khz

21.30-21.40 - Berno same

Marde: 23.45-24 - Zagreb 262 m Mi neniam provis; se iu kaptis, bonvolu skribi  
1143 khz al mi 14, rue Clair de Lune 91530 St-CHERON

Merkrede: 22.30-22.45 - Sabadell 187 m  
1602 khz Sama rimarko

Ĵaŭde: 7.10-7.25 - Vatikano 196; 48,31; 31,17; 25,61; 25,55; 19,84 m 41,38  
1530 6210 9625 11715 11740 15120 7250 khz

19-19.10; 21.30-21.40 - Berno kiel lunde

Sabate: 17.45-17.57 - Vieno: 48,74 - 30,71 - 19,28  
6155 9770 15560

19-19.10; 21.30-21.40 - Berno kiel lunde

21-21.20 - Romo 41,24 - 30,90 - 25,42 m  
7275 9710 11800 khz

21.30-21.45 - Valencio 358 m  
836 khz sama rimarko kiel ĉe Zagreb

Skribu al ĉiuj radiostacioj por ke Esperanto daŭrigu sur la ondoj (v. dorsflanke)

INSTRUKCIOJ POR LA BALOTADO: enŝovu la voĉdonilon en koverton kun indiko "Voĉdon-  
ado FKEA". Tiun sigelitan koverton enmetu en alian sendotan al la sekretario antaŭ  
la 31-a de marto. Dorsflanke de ĉi tiu lasta koverto, skribu vian nomon.

RAJTIĜILO

sendota al la sekretario antaŭ la 31-a de marto se vi ne partoprenos la kongreson

Mi subskribinte (kompleta nomo)

ne povante partopreni la kongreson en Nancy, rajtigas

voĉdoni je mia nomo por ĉiuj decidoj favoraj al FKEA.

Antaŭ ol subskribi, aldonu permane

Dato kaj subskribo:

"Bon pour pouvoir"

VOĈDONILO

sendota al la sekretario antaŭ la 31-a de marto eĉ se vi partoprenos en Nancy

1. Ĉu vi aprobas la nunan agadon de FKEA? JES NE SINDETEND (1)

2. Ĉu vi aprobas la financon raporton? JES NE SINDETEND (1)

RENOVIGOTA KOMITATTRIONO

P-ro DEGRELLE Roger (Tomblaine)

S-ro LECOCQ René (Montlouis/Loire)

F-to MARMOU René-Jean (La Houssaye-en-Brie)

S-ro VILLENEUVE Georges (St-Chéron)

(1) Forstreku la nedeziritaĵojn.

PEKINO: Radio Pekino - Esperanto fako PEKINO POPOLA RESPUBLIKO ĈINIO  
 VIENO: ORF Esperanto A 1136 WIEN AUSTRUJO  
 VATIKANO: Radiovaticana Esperanto fako Piazza Pia 3 I 00193 ROMA ITALUJO  
 BERNO: Svisa Radio Internacia Esperanto fako CH 3000 BERN 15 SVISLANDO  
 ZAGREB: Radio Zagreb Esperanto fako ZAGREB JUGOSLAVUJO  
 SABADELL: Radio EAJ 20 Esperanto fako C. Covento 22 SABADELL HISPANUJO  
 ROMO: Radio Roma Esperanto CP 320 I 00100 ROMA Centro Corr. ITALUJO  
 VALENCIO: La Voz de Valencia av. del Cid 154 VALENCIA 14 HISPANUJO

++++  
 KOTIZTABELO 1982

IKUE kun "Espero Katolika" . . . . . 60 F  
 Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

\* \* \*

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 20 F  
 Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj . . . . . 10 F  
 Bonfaranto . . . . . 100 F  
 Dumviva membro . . . . . 400 F

-----

UFE kun "Revue Française" . . . . . 125 F  
 UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro . . . . . 135 F

-----

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 36 F  
 Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

++++  
 Dépôt légal: 1er trimestre 1982 !! Polycopié par F. M. C.  
 C. P. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
 Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE